

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk




Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1980



## 24a GEFA-Jarkunveno en Oberkirch



70 jarojn GEFA

foto: W. Zietz

# Perspektivoj de Fervojfaka Asocio

GEFA kunvenis en Oberkirch

La 24a Jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio inter la 10a kaj 12a de Oktobro nunjara povis logi en la belan Rensch-valon de la Nigra Arbaro 116 partoprenantojn el 7 landoj, inter ili 32 eksterlandajn gastojn kaj unu kolegon el GDR.

## Espero inter nuboj

Solidara amikeco ne nur festas sunbrilajn tagojn, sed ankaŭ rezistas krizajn periodojn. Tial ne paradoksas la konstato, ke kvankam la tuta etoso ŝajnis pli familiara ol aliajn fojojn, ĝi tamen ne atingis la iaman ĝojan, eĉ petolan nivelon.

Nubopeza ĉielo alternanta kun pluvegoj tiun ĉi jaron anstataŭis la tradicie belan aŭtunveteron de niaj jarkunvenoj. Ne tio sola kaj tutcerte ankaŭ ne la gastiganta urbo, bone renomita en Esperantujo, kulpis pri la ĝenerale iom negaja humoro inter la kunvenintaro. Denove pluraj bonaj amikoj, aktivuloj ĉiu en sia medio, devis fini sian surteran karieron. Kaj ni post-restintoj videble pliaĝiĝas. Ĉu ne jam montriĝas esperiga lumstrio inter la griza nubaro de nia estonto?

Ne konsolas nin la fakto, ke la personara nombro de la germana fervojo samgrade moviĝas aŭ ke aliaj kulturaj organizaĵoj havas similajn posteulajn zorgojn. Al ni ne helpas lamentadi pri nekonservaj cirkonstancoj, inerta socio, laciga sateco de la kunhomoj, nebonvola sinteno de oficialuloj, mediokratio, malplenaj promesoj de aŭtoritatoj kaj kio plu estas la argumentoj de embaraso, kulpigo kaj seniluziigo. Ĉar kontraŭe ekzistas ja vera, sincera, kelkloke urĝa intereso kaj bezono pri la Internacia Lingvo. Ĉu pravas do Elfriede Kruse, kiu tiel marĝene sed koncize diris: „La tempo maturiĝas kaj ni ne estas pretaj!“

## Laborkunvenoj — laborlingvoj

Rutine funkciis la gazetara konferenco vendredon matene. En Oberkirch oni ne bezonas ekspliki kio-kial estas Esperanto. La gazetaro simple konstatas la okazadon de faka konferenco esperantista. Pli multe interesas la funkcio de la sociala kaj kultura organizaĵo BSW.

La vesperan estrarkunsidon okupis krom neeviteblaj organizaj aferoj samgrave la aranĝado de la proksima 33a IFEF-kongreso, pro kio ankaŭ dimanĉon post-

tagmeze kunvenis la kompleta LKK-Kadroprogramo por Regensburg ja preta prezentiĝas, sed multaj eroj bezonas ankoraŭ kunordigon respektivan. Speciale efika evento estos la uniformparado el kiom eble multaj fervojoj. Kiel tute novan elementon LKK ofertas literaturan konkurson el la fervoja medio. Faka kulmino sendube estos la ilustrita prelego pri „Trajnoj sen radoj“ de Gernot Ritterspach.

Moderata optimismo regis ankaŭ la kunsidon de la komisiitoj, aparte invititaj al sia sabatmatena diskutrondo. Laborlingvoj estas jenaj laŭ protokolita decido el 1966/68: Normale la Internacia (principaro de Frostavallen), escepte la germana kiam partoprenas gastoj de BSW aŭ DB.

Ni scias, ke nombro da neesperantistaj organizaĵoj religiaj, politikaj, fervojfakaj, ekkonate ties utilon, laŭstatute deklaris Esperanton kiel komunan interkomprenilon aŭ kiel laborlingvon, por citi nur tri:

La Bahai-anoj, la Eŭropa Federalista Partio kaj ĵus AEC (la Asocio de Eŭropaj Fervojistoj) sukcesis akceptigi Esperanton apud la lingvoj franca, germana kaj itala. Ĝuste tiu lasta interesas nin; certe ne malutilus aktiva AEC-membriĝo de IFEF-anoj el ĉiuj eŭropaj landoj.

La asocio de la staciestroj kaj bedaŭrinde ankaŭ FISAIC ne jam apartenas al tiuj progresemaj organizaĵoj, kiuj en sia plimulto komprenis la avantaĝon de Esperanto kaj sukcesis venki arogantajn antaŭjuĝojn. Ne mankas klopodoj ankaŭ en FISAIC. Pluraj referaĵoj de IFEF-prezidanto Giessner, multaj bonaj kontaktoj kun FISAIC-estraranoj kaj laste la iniciato kaj rezoluci-propono de delegito Kurt Greutert ne pretervideble plugadas la kampon.

Ĉu intence aŭ erare la kunsido de komisiitoj ĉi-foje ne estis deklarita nepublika. Malgraŭ tio la publiko absolute malestis. Oni spertis en komunumaj parlamentoj, ke interesita publiko ne nur

tedas kelkajn deputitojn, sed ankaŭ spronas aliajn kaj povas doni freŝajn impulsojn al rigidigintaj procedoj.

La jarkunveno 1981 ne okazos en la konata amplekso, sed nur kiel dutaga laborrondo por GEFA-funkciuloj pro la IFEF-kongreso samjara en Regensburg. Por 1982 provizore samjara la distrikto Frankfurt/Main al Friedberg aŭ alia urbeto en tiu regiono. Aliaj datoj el la kongreskalendaro: 3a ĝis 4a de Oktobro 1981 Nogelo kun loka jubileo en Bremen; 25a ĝis 26a de Septembro 1981 franca jarkunveno de FFEA post la ŝatata feriosemajno; ĉ. la 10a de Majo 1982 komenco de la 34a IFEF-kongreso ĉe la hungara Balaton; pence-koston 1982 GEA-kongreso en Münster kun nederlanda-germana renkontiĝo.

Neniam findiskutita estas la temo „varbado“, modvorte pli komplekse „informado“. Logi, vekti atenton, nerefereteble argumenti, aranĝi, gvidi kursojn sendube estas same grave, kiel sistema klopodado, teni la interson post la kursoj, konduki la interesitojn en la lingvan medion kaj singarde integri iilin en la tutmonda movado. Multaj ideoj, spertoj, procedoj ĉiam pli rapide, kiel la hasta nuntempo, perdas sian aktualan valoron. Kaj ĉiam daŭras la diskuto pri la plej bonaj metodoj, kiuj neniam restas la samaj.

### **Novaj vojoj — novaj sukcesoj**

Tiel ni daŭre restos serĉantaj praktikeblajn varbmetodojn, kiuj promesas optimalajn rezultojn el niaj limigitaj rimedoj. Kelkaj el nia kolegaro ja provis novajn vojojn, elpaŝis el la kriptoklanismo de ia samideanaro, kaj ili iris, absolute laŭvorte, sur la straton por demonstracii, por eksponi la Internacian Lingvon, paroli kun la pasantoj. Certe nova stilo de varbado, evidente efika. Sed nur konvinkito povas konvinki. Ne plu kiel antaŭ 75, 60 kaj ankoraŭ 35 jaroj la homoj venas amase al ni, serĉantaj idealisman vivostilon, aŭ pro revolucio, aŭ simple pro sopiro je paco kaj interkompreniĝo post la teruraj hombuĉadoj. Ni devis ekkoni la sobran realismon nuntempan, kiun ankaŭ moda nostalgi-ondo ne povas falsi, kaj ni ne dubas pri tio, ke ni scias la plej bonan solvon de la pli kaj pli akuta lingva problemo. Sed kiu „homo surstrata“ konscias pri lingva dilemo kaj ties sekvoj por ĉiu individuo? Samkiel neniu atentis pri

polucio, ĝis kiam la ekologia malekvilibro katastrofe gigantiĝas.

Malmultas misi-talentaj propagandistoj; tamen ĉiu volontulo estas bezonata kaj laŭ siaj kapabloj povas trovi sian lokon, adekvatan postenon en la paca batalo. Tiucele organize kunordigi, okupi grupojn laŭ kapabloj individuaj, plani kaj gvidi kampanjojn eĉ plej etajn, restos dankinda tasko.

### **Sinprezentoj reprezentaj**

Al la flage ornamita enirejo de la urbohalo (vidu la titolbildon) la malfruan vendredan posttagmezon oni vidis kureti subpluve kelkdekon da homoj. Malfermante Esperanto-ekspozicion kaj librostandon kompetentaj reprezentantoj paroladis pri strukturo kaj taskoj de BSW ĝenerale, pri la urbo Oberkirch kaj ĝiaj rilatoj al Esperanto speciale, pri la 70jara historio de GEFA entute: fervoja direktoro Alvermann kiel estrarano de BSW Karlsruhe, urbestro Braun kiel elektito de la urba konsilantaro, prezidanto Giessner kiel aŭtoro de la historia verko. Urbestro Braun regalis la gastojn per glaso da bona vino el tiu regiono. Dumbabile trinketante la tiel afable salutitajn delegitojn atendis bone ekipita libraro de Margarete kaj Hermann Schmid kaj abunde kompilita ekspozicio, al kiu la loka grupo investis multajn laborhorojn.

La urba orkestro Oberkirch sub Walter Tuschla per freŝa blovmuziko komencis kaj kadrumis la sabatan festvesperan programon. Prezidanto Giessner oficiale malfermis la jarkunvenon bonvenigante gastojn, gemembrojn kaj lokajn kunlaborantojn. La vicon de salut-parolantoj komencis sinjoro Hill, la funkcigvida estrarano de BSW Karlsruhe, al kiu GEFA dankas la inviton kaj financon subvencion. Li eksplikis sencon kaj laboron de la Sociala Organizo BSW kaj en tiu konekso agnoskas nian agadon konsiderinda kontribuo al plivastigo de mond-koncepto ne limigita de lingvaj baroj.

Vicurbestro Männle por la komunuma konsilantaro, sinjoro Ockenfuß por la sindikato GdED kiel por la personara reprezentantaro Karlsruhe kaj sinjoro Bätz por la distriktestraro de la sindakato GDBA, ĉiuj tri edife koncize formulis siajn salutojn. Kaj neniu promesis lerni Esperanton.

Sinjoro Heiß parolis nome de GEA: „GEFA havas sian apartan pozicion en la Germana Esperanto-Asocio“. Sinjoro Poppeck salutis por TANEF kaj la loka grupo, kiu multege laboris por nia jarkunveno. Sinjoro de Bruyne, Bruselo, transdonis la bondezirojn de la nova UEA-prezidanto Maertens. Kolego Helmut Döpfer reprezentanto de AEC (vidu supre : laborlingvoj), unuan fojon inter ni, laŭ siaj vortoj ekkonis tre baldaŭ, kiom la lingva diverseco malhelpas kunlaboron en internacia organizaĵo, kaj konkludis konsekvence. Hermann Schmid prezentis al ni la salutojn de la Bavara Esperanto-Ligo.

Wim van Leuuwen havis bondezirojn de IFEF. Kolego Patteck kunportis salutojn el Aŭstrio kaj speciale de la Aŭstria Radio, Esperanto-redakcio. Nomo de la belga asocio salutis ties prezidanto De Sutter kaj invitis al la ĝenerala kunveno de BEFA. Gérard Horn estis veninta por la franca FFEA. El Nederlando kolego van t'Hoog parolis la bondezirojn de FERN. Svislandajn salutojn diris Otto Walder kaj la konstato, ke per Esperanto li pli bone interkompreniĝas eĉ inter germanlingvanoj.

Kun aparta ĝuo oni aŭskultis la jam konatan Walter Lange el Herzberg. Li kantis pianoforte akompanate de sia filino Beate ariojn kaj popolkantojn reverkitajn de Joachim Giessner. Ĝis malfrua nokto diligentis orkestro Tilo Karkutsch kun modernstilaj dancoj por ĉiu generacio. Ankoraŭ la saman vesperon la festantoj aŭdis originale la ĉi-tagajn bondezirojn de la Aŭstria Radio al GEFA, kion teknike ebligis Walter Poppeck.

### **Turisme, kulture, kaj . . .**

La turisman programon ne malmulte ĝenis menciitaj pluvoduŝoj, malvarmo kaj griznubeco. Spertaj urbĝvidantoj tamen klopodis montri historie interesajn kaj pejzaĝe belajn vidindaĵojn. Pilgrimantoj al la Esperanto-strato havis senpagan ĉielan memorbapton.

Aŭtobusveturo tra la Nigra Arbaro demonstris, kiel bela povus esti tia vojaĝo. Plej veterkonvena fakte evidentiĝis la vizito al brandofarejo, kie oni ne nur gustume trinkis kaj manĝis, vidis grandan kolekton de folkloraj vestoj kaj laboriloj, sed

ankaŭ lernis diferencigi inter akvo, spiritoj kaj fantomoj.

Dimanĉon je la 10 h preskaŭ akurate komenciĝis la matineo kun sonfilmo pri Regensburg. Kolego Barnickel donis al la spektantoj scivoligan impreson pri la urbo de la 33a IFEF-kongreso.

GEFA-prezidanto Giessner citis el la 70jara historio de GEFA kaj prezentis ekstrakon el la jarraporto, kiu komplete aperas aliloke. Li desegnas ne rozkoloran estonton. La venko eble ne estas proksima, sed certa!

Sendiskute la kultura kulmino estis prezentata de la Pola Esperanto-Teatro „Grabowski“. La dramo „Malfermu la pordon“ de K. Choinski en frape realisma maniero pensigas pri absolute aktuala problemoj, kian tiel ni ne vidis antaŭe: streĉa atento de la unua ĝis la lasta vorto, ŝoka kompreno. Sed tia dialoga teatraĵo-formo, kiun tiuj ĉi geaktoroj majstras, ankaŭ evidentiĝas fortojn kaj limojn de duperpersona teatro. Kaj la elekto montris al ni, ne nepre tranĉvilige, pli vere klarige, ke la t.n. okcidenta socio en siaj esencaj vivesprimoj nuntempaj tute ne tiel malproksimas de la orient-eŭropa (por ne diri socialista). Pro la elstare verva aktora interpretado ni kore dankas al Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski. Gojigitaj pri tia institucio kulturportanta, ni iom fieras pri nia vivanta lingvo. Unika rimedo!

Kaj . . . kun serioza zorgo ni legas la jarraporton. Ĉu batali aŭ pereji? Ĉu ni vere ankoraŭ estas konvinkitaj pri fina venko? Ĉiu devas demandi sin, kritike kontroli siajn argumentojn, sian pretecon pri kunlaboro, ja ankaŭ sian lingvoscion kaj praktikadon! Por esti preta, kiam la tempo maturiĝas. wbr

### **Fervoja Terminareto**

Restas stoko je via dispono. Vi nepre bezonas ĝin por bone kompreni fakajn artikolojn kaj alkutimiĝi al la fervojista lingvo. Krome ĝi estas bonvena donacaĵo. Ne forgesu aĉeti la terminareton germana-esperanta kaj esperanta-germana. La reduktia prezo: 5,— GM, ricevebla ĉe nia kolego Gernot Ritterspach, 6500 Mainz, Alexander-Diehl-Straße 3, tel. 06131/81297, aŭ deĵore ZVL (AA 5401), 6500 Mainz (Basa 954/5533).

# Jarraporto

pri la periodo de la 23a ĝis la 24a jarkunveno (1979/80)

## GEFA 70-jara

Ĉi-jare ni komencu ĉe la fino, ĉe la 24a jarkunveno, kiu preskaŭ ekzakte markas la tagon, kiam antaŭ 70 jaroj, nome la 2an de Oktobro 1910, en Elberfeld estis fondita „Vereinigung deutscher Eisenbahn-Esperantisten“. Tiu asocio, kiu ankaŭ fariĝis landa societo de la „Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj“, sufiĉe vikle vivis ĝis la eksplodo de la unua mondmilito. Gvidantoj de la germana asocio el Dresden (Engst) kaj Leipzig (Petzold) eĉ en 1911/12 jam transprenis la oficojn de vicprezidanto resp. sekretario en la internacia federacio. Bedaŭrinde ni ne konas la tiaman membronombro, certe ne tro altan. Post la milita interrompo la asocio denove ekvivis sub prezido de Georg Habelok (Breslaŭ). Aperis „komunikaĵoj“ multobligitaj. La postmilita tempo, inflacio, maldungoj, okupacio de la Ruhrregiono tre malfaciligis la agadon de la tiamaj kolegoj. Sed ili estis ekzempledone obstinaj. Habelok eĉ eldonis terminareton kun 1300 vortoj, kiu kostis 0,50 RM oble „ŝlosilo de la librovendistoj“, tio estis en Septembro 1923 1 200 000 RM. Ĉiujare oni aranĝis ĝeneralajn asambleojn. Membrolisto el 1930 havis 95 nomojn. Prezidanto estis Petzold (Leipzig), kiu eĉ en 1934 ankoraŭ esperis, povi aranĝi sin kun la potenculoj de la Tria Regno. Sed tiuj likvidis la asocion verŝajne en 1935. Sekvis la granda truo.

Sed ne sekvis ruino. Kiel mi jam kelkfoje povis konstati dum la specialaj aranĝoj por niaj emerituloj, estis ĝuste la simplaj esperantistoj, kiuj sekrete konservis la esperantan spiriton tra la fantoma epoko kaj la teruraj postmilitaj jaroj. Jam en 1947 oni denove instruis Esperanton en fervojaj faklernejoj. La fakta refondo okazis dum la Germana Esperanto Kongreso Pentekoston 1948 en München. Kolego Schuchmann transprenis la gvidadon. Eĉ la tiam Ĝenerala Direktoro de la Regna Fervojo, Busch, salutis la GEA-Kongreson 1948 en Göttingen. Gvidis nun kolego Pape (Hamburg). En Novembro 1949 la ĉefestraro de BSW instalas konsilantaron por Esperanto kaj distriktajn komisiitojn kaj en Januaro 1950 ĝi petis de IFEF la akcepton de la

germana landa asocio kun provizore 60 membroj. La nuntempa GEFA estis naskita.

Ekde la 2a IFEF-kongreso en Salzburg la germanaj kolegoj regule estis reprezentitaj.

Ekde tiu kongreso ili ankaŭ kunlaboras en la tiam fondita Terminara Komisiono, ĉiam en gvida aŭ decida pozicio. 1951 sekvis faldprospekto de DB, la unua en multjara vico. Jam en 1952 GEFA transprenis la 4an IFEF-Kongreson en Lindaŭ, kiun vizitis i. a. 128 germanoj el entute 212 membroj. El la tiamaj LKK-anoj estas ankoraŭ inter ni la kolego Lepke kaj mi, sed ankaŭ Pape, kiu estas ankoraŭ nia membro. En aŭtuno 1952 aperis la unua numero de „Bulteno“. Ek de 1953 la germana horaro enhavis Esperanton. Venis novaj prezidantoj, nome en 1953 Simon, en 1954 Hasse, kiuj tamen ne ĉiam povis plenumi siajn taskojn, kaj fine en 1957 mi kun interrompo de 1968 ĝis 1972, kiam Brandenburg estis prezidanto.

Estas simple ne eble, en la kadro de tia raporteto doni eĉ nur koncizan super-rigardon pri la ideoj kaj atingoj de tiuj jaroj. Estis entute prospera epoko, kies krono fariĝis la 19a IFEF-Kongreso en Fulda. El ĝia LKK tri personoj eĉ denove estas en LKK Regensburg. Mi nur fine deziras mencii, ke en 1957 la nova estraro decidis, prove okazigi jarkunvenon. Tiel okazis la unua kun 94 partoprenantoj en Fulda kun tia rezulto, ke la jarkunvenoj fariĝis regula ero de nia laboro, kaj ili pli kaj pli evoluigis al ŝatataj renkontiĝoj de germanaj kolegoj kaj eksterlandaj geamikoj.

Ne estis eviteble, ke la ĝenerala evoluo speguliĝis en la asocia vivo. La elano kaj la streĉado de la malmultaj personoj, kiuj dum pli ol kvarona jarcento zorgis kaj zorgas por la asocio, ne ĉesis. Sed la krestanta ekonomia bonfarto, la penetro de la televido en la familiojn, la plifortiĝanta materia orientiĝo de la junularo kaj ne laste la konata evoluo ĉe la fervojo kondukis malgraŭ ĉiuj klopodoj al certa regreso laŭ membronombro kaj atingiĝoj. Relative detale vi povas legi tion en speciala dokumenta numero 5

de „Bulteno“, kiu ĝuste aperas okaze de la 70a jubileo de GEFA kaj prezentas superrigardon pri la jaroj 1962 – 1980 (la epoko de 1910 ĝis 1961 troveblas en speciala numero 7/61). Pro tio jen ne necesas priskribi la pasintajn du jardekojn. Sed decas diri dankon al ĉiuj konataj kaj nekonataj gehelpantoj, kiuj kontribuis por vivteni la asocion. Tiu danko estas sincera kaj inkludas la peton, same kunlabori estontece. La asocio estis kaj restos nia komuna tasko.

Tiel ni revenas al la nuntempo kaj mi prezentu la aktualan jarraporton. Denove forpasis tri multjaraj membroj, nome

Paul Buchwald	10. 12. 1979,
Friedrich Nickel	18. 12. 1979,
d-ro Wilhelm Lang	18. 7. 1980.

Ili pace ripozu.

## 1. Organizaj aferoj

### 1.1. Membrostato

Por 1980 GEFA pagis al IFEF 817 kotizojn por individuaj kaj korporativaj membroj. Sekve ni denove havas rajton je 5 komitatanoj. Komence de 1980 ni havis 498 individuajn membrojn, du pli ol jaron antaŭe, kiu signifas, ke la lastjara varbkampanjoj provizore haltigis la kelkjaran regreson. Tamen nur provizore, kaj ni devas klopodi, eĉ klopodegi, por inversigi la tendencon. Jen la plej urĝa tasko por la venontaj jaroj, tasko por ĉiu unuopa membro.

### 1.2. Kotizo

Por adaptiĝi al la kotizplialtigo de IFEF en 1980 ni same nove fiksas la kotizon al nun 12 GM jare, validan de 1. 1. 1980.

### 1.3. Kunlaborantoj

Denove ni devas anonci personajn ŝanĝojn en la oficoj de la distriktkomisiitoj. En **Karlsruhe** emeritiĝis Josef Hug, kiu pli ol 20 jarojn administris tiun postenon. Transprenis la taskon aldone al sia kasista ofico Karl Bernhard, kiu jam de kelka tempo subtenis Hug kaj kiu preparis por ni ĉitium 24an jarkunvenon.

En **Saarbrücken** Norbert Müller post 6 jaroj redonis la oficon en la manojn de Alois Hauptenthal, kiu jam antaŭe multajn jarojn estis distriktkomisiito en Saarbrücken. Kun sincera danko ni adiaŭas la du ĝisnunajn komisiitojn kaj esperas, ankoraŭ ofte revidi ilin en jarkunvenoj kaj kongresoj. Sed ankaŭ al la du novaj ni

kore dankas, ke ili transprenis la novan taskon, kaj ni deziras al ili ĝojon kaj bonajn rezultojn. Ankoraŭ ne ni disponas pri komisiito por informado, kiu konstante mankegas. Ĉu neniu ŝatas okupiĝi pri tiu interesa afero?

La laborkonsilantaro kunvenis dufoje kun la distriktoj kaj specialaj komisiitoj, nome en Heilbronn kaj en Marto en Frankfurt/M.

## 1.4. Kursoj

El la 8 kursoj komencitaj en 1978 finiĝis 6 kun 19 partoprenintoj, 6 novaj kursoj komenciĝis en 1979, denove tro malmulte. Sed ĉu la 19 personoj, kiuj restis ĝis fino, nun estas niaj membroj? Ĉu la kursgvidintaj prizorgas ilin? Ĉu ili eble estas ĝuste tiuj, kiuj mankas por poluri nian statistikon?

## 1.5. 33a IFEF-Kongreso

La preparado de tiu kongreso dum la tuta jaro marŝis. LKK kunvenis tuj post fino de la jarkunveno en Heilbronn, krome 21. 3. 80 en Frankfurt/M. kaj 2. 8. 80 en Würzburg. Okazis lokaj preparoj en Nürnberg, Regensburg kaj en la lokoj de la ekskursceloj. Membroj de LKK estas Gießner (prez), Graß (vicpr+kas), Kruse (sekr), Röder (eksk), Schrapp (loĝ), Barnickel (info), Müller, Hans (spec. komisiioj). Por prospektoj de la urboj Regensburg, Passau, Falkenstein kaj Kehlheim ni jam pretigis tradukitajn aldonaĵojn. Tiujn pri Regensburg ni diskonigis en la UK Stockholm kaj SAT-Kongreso Rijeka. La tradukojn faris G. Ritterspach. En la 32a IFEF-kongreso en America ni prezentis sonfilmon pri Regensburg, vendis kelkajn mil kolorojn glumarkojn kaj donis 300 aliĝilojn al interesuloj.

## 2. Kunlaboro en IFEF

La 32a kongreso en America (Lb.) en la najbara Nederlando ankaŭ ĉifoje allogis 66-kapan grupon da niaj membroj. Kiel komitatanoj nin tie reprezentis Barnickel, Graß, Kiefer, Rösemann, Schrapp, kiel anstataŭanto Heimlich. Ampleksan dulingvan resumon de la interesa fakprelego oni trovas en Bulteno 3/80. Bonvolu vaste utiliĝi ĝin.

Daŭras la intensiva laboro de la Terminara Komisiono, al kiu Hartig per sia Terminara Kuriero ĉiam denove donas impulsojn

kaj grave progresigas la terminaran laboron. Sed ankaŭ rilate al la fakprelegoj ni ne ĉesis nian kunlaboron, kvankam ni ne plu gvidas la Fakprelegan Komisionon. Ties sekretario Ritterspach grave subtenas la agadon de la dana gvidanto Thuesen.

Post 12jara laboro kiel sekretario de IFEF Elfriede Kruse demisiis de tiu posteno en America, tiel ĉesante sian servon en IFEF, kiu sendube por ĉiam stampis la evoluon de IFEF dum tiuj jaroj.

### 3. Kontaktoj, aranĝoj

De la 5a ĝis la 7a de Oktobro 1979 estis aranĝita la 23a jarkunveno en Heilbronn. Por 202 partoprenantoj (gastoj el 5 aliaj landoj) ĝi denove fariĝis daŭra agrabla memoraĵo. La GEFA-ekzamenkomisiono turmentis 6 kandidatojn, kiuj sukcesis en la ekzameno por lingva kapableco.

Samtempe GEA okazigis sian jaran ĉefkunvenon, tiel profitante de nia jarkunvena programo.

La kutimaj sennombraj personaj kontaktoj de GEFA-anoj neniel mankis, ĉu en formo de simplaj vizitoj, ĉu okaze de partopreno en eksterlandaj jarkunvenoj, en la UK Stockholm, en la Internacia Skisemajno en Plan (Sudtirolo) kaj aliaj.

La kontaktoj kun BSW, GEA, GEJ restis bonaj. Personaj vizitoj de estraranoj ĉe la sindikatoj pli intensivigis la bonajn rilatojn kaj krome preparis la grundon por la kunagado de la sindikatoj en la 33a IFEF-Kongreso.

### 4. Informado

„Bulteno“ aperis 6-foje (n-roj 5/79 ĝis 4/80 inkl. speciala dokumenta n-ro) kun entute 46 paĝoj kaj 8 bildoj. Kiel ĉiam ĝi liveras ĉiujn necesajn informojn kaj donas impreson pri la asocia vivo. Kelkaj grupoj bone subtenas la redaktoron liverante raportojn. Bedaŭrinde ĉi-jare krom 11 publikaĵoj en DB-Amtsblatt ni nur povis registri 33 artikolojn en la gazetaro. La restojn de nia ekspozicio ni parte renovigis kaj esperas utiligi ilin ankaŭ estontece. En Frankfurt, Hannover, München kaj Stuttgart niaj grupoj organizis ekspoziciojn aŭ kunlaboris en ili. Minimume du radiointervuoj okazis. Estis eldonitaj ĉirkaŭ 3 600 informiloj A 4, 1 400 broŝuroj, 1 100 flugfolioj kaj 1 200 aŝiĝoj.

### 5. Emerituloj

Sub gvido de Elfriede Kruse okazis la ĉi-jara renkontiĝo por emerituloj la 6.9. en Koblenz. Bedaŭrinde el 100 adresitaj membroj nur respondis iom pli ol 30. Fakte partoprenis 27 personoj. Spite al la relative malalta nombro de partoprenantoj ni opinias, ke oni daŭrigu tiujn kunvenojn, ĉar la speciala etoso tie pravigas ilin.

### 6. Perspektivo

La estonto ne estas rozkolora. El la finvortoj de la dokumenta Bulteno 5/80 mi citu laŭsence: La venko de la Internacia Lingvo ne jam alproksimiĝis, kvankam kun certeco ĝi venos. Neniam ni lamu, same kiel neniam lamis la kreinto de tiu lingva miraklo, d-ro Zamenhof. Ni ne pretervidu, ke nia estonteco estas la junularo. Ek al la 8a jardeko!

kompilis Giessner

## Jahresbericht (Auszug in deutscher Sprache)

über den Zeitraum von der 23. bis zur 24. Jahresversammlung

### Unsere Vereinigung 70 Jahre alt

Am 2.10.1910 wurde die „Vereinigung deutscher Eisenbahn-Esperantisten“ in Elberfeld ins Leben gerufen. Sie schloß sich bald dem internationalen Verband an, für den sie bereits vor dem 1. Weltkrieg 2 Vorstandsmitglieder stellte. Auch zwischen den beiden Kriegen überwandten die damaligen Kollegen alle Schwierigkeiten (Inflation, Ruhrbesetzung, Abbau und Entlassungen, Weltwirtschaftskrise) mit bewundernswertem Widerstandsgest. Selbst nach der dunkelsten Zeit, nach Auflösung und Verfolgungen im Dritten

Reich, waren sie bald nach Kriegsende „wieder da“.

Ab 1947 wurde Esperanto in Eisenbahn-Fachschulen unterrichtet. 1948 wurde die Vereinigung formell wieder errichtet und trat im Januar 1950 dem internationalen Verband IFEF als deutscher Landesverband bei. Die Entwicklung von Anfang bis 1961 ist in einer dokumentarischen Sonderausgabe des „Bulteno“ 7/1961 dargestellt worden. Das weitere Geschehen enthält die Nr. 5/1980, wiederum als Sondernummer.

## **1. Organisatorisches**

### **1.1. Mitgliederstand**

Für 1980 hat GEFA an IFEF 817 Beiträge für Einzel- und korporative Mitglieder gezahlt. Bei Beginn des Jahres hatten wir 498 Einzelmitglieder. Somit hat die Werbung im vergangenen Winter den Rückgang aufgehoben. Trotzdem ergeht an jeden Einzelnen die Bitte, vordringlich neue Mitglieder zu werben.

### **1.2. Beitrag**

Zur Angleichung an die Erhöhung des Beitrages bei IFEF wurde der GEFA-Beitrag auf monatlich 1,- DM festgesetzt, gültig ab 1. 1. 1980.

### **1.3. Mitarbeiter**

2 Bezirksbeauftragte wechselten: In Karlsruhe trat Josef Hug in den Ruhestand, Nachfolger Karl Bernhard, in Saarbrücken übernahm Alois Haupenthal nach sechsjähriger Unterbrechung das Amt wieder aus den Händen von Norbert Müller. Leider konnte der Posten eines Sonderbeauftragten für Information und Werbung noch immer nicht besetzt werden.

Der Arbeitsausschuß kam mit den Beauftragten zur Jahresversammlung Heilbronn und im März in Frankfurt/M. zusammen.

### **1.4. Kurse**

1979/80 wurden 6 Sprachkurse durchgeführt.

### **1.5. 33. IFEF-Kongreß Regensburg**

Die Vorbereitungen liefen während des ganzen Jahres. Der Kongreßausschuß trat mehrfach zusammen, mit örtlichen Stellen und in den Ausflugsorten wurden zahlreiche Besprechungen geführt. Im 32. Kongreß Mai 1980 gaben wir 300 Anmeldevordrucke und 3000 farbige Briefverschlusßmarken aus. Ein farbiger Tonfilm über Regensburg wurde durchgeführt.

### **2. Mitarbeit in IFEF**

66 Deutsche nahmen am 32. IFEF-Kongreß

in America (NL) teil. GEFA wurde durch die Kollegen Barnickel, Graß, Kiefer, Rösemann und Schrapp, später auch Heimlich vertreten. Der Fachvortrag behandelte den Brückenbau in den Niederlanden, eine zweisprachige Zusammenfassung findet sich im Bulteno 3/80. Nach 12jähriger Tätigkeit als IFEF-Sekretärin legte Elfriede Kruse dieses Amt nieder.

### **3. Kontakte, Veranstaltungen**

An der 23. Jahresversammlung in Heilbronn nahmen 202 Personen teil, darunter Gäste aus 5 Ländern. 6 Kandidaten bestanden die Sprachprüfung vor dem GEFA-Prüfungsausschuß. Der Deutsche Esperanto-Bund hielt gleichzeitig seine Jahrestagung ab.

Eine größere Zahl unserer Mitglieder nahm an der Internationalen Skiwoche in Plan (Südtirol) teil, aber auch an anderen Veranstaltungen (Allgemeiner Weltkongreß Stockholm, ausländische Jahresversammlungen, Ferienwochen).

Die Zusammenarbeit mit dem BSW, dem Deutschen Esperanto-Bund und dem Deutschen Esperanto-Institut war gut, mit den Gewerkschaften wurde sie im Hinblick auf den Kongreß Regensburg intensiviert.

### **4. Information**

„Bulteno“ erschien sechsmal (einschließlich Sondernummer) mit 46 Seiten und 8 Abbildungen. Wie immer liefert es die notwendigen Informationen und gibt einen Eindruck vom Leben der Vereinigung. In den Amtsblättern erschienen 11 Veröffentlichungen, in der Presse konnten wir 33 Artikel unsere Tätigkeit betreffend feststellen. In 4 Städten wurden Ausstellungen gezeigt. Etwa 6000 Flugblätter und Informationsschriften wurden verteilt.

### **5. Altenbetreuung**

Die Ruheständler trafen sich dieses Jahr am 6. 9. in Koblenz.

### **Ekzameno pri lingva kapableco**

En la kadro de la 33a IFEF-Kongreso germanlingvanoj havos okazon partopreni la ekzamenon de la Germana Esperanto-Instituto pri lingva kapableco. Versajne la skriba parto okazos lundon (18a de Majo) je 9.00 h kaj la buŝa parto merkredon (20a de Majo) je 9.00 h. Interesuloj el ĉiuj landoj, kiuj regas la germanan lingvon

povos partopreni. Aliĝoj kaj informoj ĉe BAR Fritz Lautenbach, Bf, 6400 Fulda, Basa 957/822/120.

### **Neues Mitglied**

Wir begrüßen in unserer Mitte Rudolf Werner, Bf Oberhausen Hbf, der von M. Retzlaff geworben wurde.



## Regensburg, die Stadt des 33. IFEF-Kongresses




Regensburg 15. – 21. 5. 1981

Im Oktober 1963 beteiligten sich 250 deutsche und ausländische Eisenbahner-Esperantisten in Regensburg an ihrer 7. Jahresversammlung. Im Mai 1981 wird die Donau-Stadt eine weitaus größere Zahl zum 33. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten begrüßen können, der unter der Schirmherrschaft des Internationalen Verbandes

der kulturpflegenden Eisenbahner (FISAIC) stehen wird. Ein bedeutsames Ereignis in einer attraktiven Stadt.

Regensburg kennt sein Gründungsjahr genau: 179 vor Chr. Grund genug, um 2000 Jahre später ein festliches Jubiläum zu feiern, das mit einem römischen Militärlager begann. Aus dem Castra Regina wurde Reganesburc, im Jahre 530 Hauptstadt von Bayern, dann Kaisersitz der Karolinger, Herzogs- und Königsstadt und später eine wichtige Handelsmetropole dank der günstigen Lage an der Donau und den dort mündenden vier Flüssen.

Die selbstbewußte Stadt wählte als Wappen zwei sich kreuzende Schlüssel, die übrigens auch im Emblem des IFEF-Kongresses erscheinen. Von 1663 bis 1806 war Regensburg auch Sitz des immerwährenden Reichstags, einem Parlament der Stände. Im Rathaus sind noch heute die historischen Stätten zu besichtigen.



Regensburg – Blick von der Alten Steinbrücke zum Brückenhause und Salzhaus

Die Schönheit der Stadt liegt in ihrem mittelalterlichen Kern. Gotische Türme, hohe Patrizierhäuser, verwinkelte Straßen, der St. Petersdom bilden zusammen mit der 800jährigen Steinbrücke ein einzigartiges Stadtbild. Die Teilnehmer werden ihre Kongreßstadt näher kennenlernen, mit sachkundiger Führung oder auf eigene Faust. Sie können im Dom die berühmten Sängerknaben, die Regensburger Domspatzen, hören oder den für sie veranstalteten Konzertabend in der Rokokokirche Alte Kapelle besuchen.

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk strebt wiederum einen Kongreß ohne Zeitverluste an. Das Kongreßgebäude, das Kolpinghaus, liegt zentral, in der Nähe der Donau, vom Bahnhof nur 15 Minuten entfernt. Dort wird während der ersten beiden Tage eine Informationsstelle eingerichtet. Die angereisten Teilnehmer können zunächst ihre zugeteilten Quartiere beziehen, ehe sie im Kongreßgebäude die übrigen Formalitäten regeln.

Im Kolping-Haus finden fast alle Veranstaltungen statt. Auch die gemeinsamen Essen können dort eingenommen werden, soweit sie nicht Bestandteil der Ausflüge sind. Von besonderem Interesse wird der Fachvortrag sein, in dessen Mittelpunkt ausnahmsweise nicht das Schienenrad steht. In Arbeitssitzungen wird der Stand der Übersetzungsarbeiten am UIC-Fachwörterbuch dargelegt, und natürlich werden auch die zahlreichen organisatorischen Probleme behandelt. Eine Esperanto-Ausstellung, auch von Briefmarken, ein Sonderpostamt, ein Informationsstand in der Fußgängerzone und ein Bücherstand werden die Verbindung zur Stadtbevölkerung herstellen. Presse und Rundfunk werden unterrichtet. Erstmals beteiligen sich Funkamateure, und ebenfalls erstmals wird ein Literaturwettbewerb ausgeschrieben. Der weit bekannte Magier Trixini wird den Kongreß einen ganzen Abend unterhalten. Wer das 500-Zimmer-Schloß mitsamt einer berühmten Kutschensammlung des zwar nicht regierenden, jedoch wohlhabenden Prinzen von Thurn und Taxis besichtigen will, hat hierzu Gelegenheit. Auf eigene Kosten, versteht sich. Natürlich fehlen auch nicht Ausflüge mit Bus und Schiff, worüber noch besonders zu lesen sein wird.

Die Vorbereitungen sind längst angelaufen. Persönlichkeiten des öffentlichen Lebens, der DB, des BSW, der Gewerkschaften und anderer Organisationen haben ihr Erscheinen zur feierlichen Eröffnung am Samstag, 16. Mai 1981 zugesagt. Sicher haben Sie Ihre Anmeldung abgesandt und damit vom niedrigen Kongreßbeitrag profitiert. Vergessen Sie auch nicht, sich mit den ansprechenden Klebmarken einzudecken. Weitere Informationen folgen.

### **Örtliches Komitee des 33. IFEF-Kongresses**

#### **Berichtigung zu BULTENO Nr. 4/1980**

Entgegen unserer Ankündigung erhalten die Kongreßteilnehmer ihre Quartierbestätigung nicht unmittelbar vom Verkehrsamt der Stadt Regensburg, sondern vom Örtlichen Kongreßkomitee. Die Anschrift des Hotels oder der Pension wird auf der Rückseite der übersandten Kongreßkarte bekanntgegeben.

#### **Literatura konkurso de fervojistoj**

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) havas ĉi jare interesan ideon: sub la nomo „La Verda Relo“ oni proklamis Literaturan Konkurson por originalaj kaj tradukitaj verkoj pri la fervojo.

La konkurson rajtas partopreni ĉiu esperantisto escepte de la membroj de juĝkomisiono kaj de la Loka Kongresa Komitato.

La proklamado de premiitoj okazos solene dum la sekvontjara kongreso de IFEF (15a ĝis 20a de Majo 1981 en Regensburg).

Por la partopreno en la konkurso validas jenaj kondiĉoj:

La tradukitaj verkoj neniam aperis ie en presita formo.

La poeziaĵoj ne enhavu pli ol kvindek versojn.

La prozaĵoj ne ampleksu pli ol 4 paĝojn (formato A 4, interlinio 2).

Ĉiujn kontribuadojn necesas sendi en 4 ekzempleroj; ili estu klare tajpitaj. Ĉiu partoprenanto en la konkurso rajtas prezenti po du verkojn en ĉiu branĉo:

originala kaj tradukita poezio resp. originala kaj tradukita prozo.

Por tradukaĵoj oni devas aldoni kopion de originalo.

La konkursaĵoj devos atingi plej malfrue ĝis la 31a de Januaro 1981 la sekretari-  
inon de la juĝkomisiono:


Elfriede Kruse, Wiener Straße 121,  
D-6000 Frankfurt/Main 70, FR Germanio.

## Nekrologo

La plej maljuna esperantisto de nia  
grupo Nürnberg

**Reinhold Schmidt (82)**

8500 Nürnberg, Johannisstr. 33/172,  
mortis la 19an de Septembro 1980.  
Ek de 1921 li okupiĝis pri Esperanto.  
Preskaŭ ĉiun jaron li partoprenis kun  
sia edzino kongresojn kaj jarkunvenojn  
en- kaj eksterlande kaj havis kontakton  
kun siaj leteramikoj en la tuta mondo.



En 1967 li kolektis 540 subskribojn por  
la UN-rezolucio. Ĉiu aktiva fervojista  
esperantisto konis lin. Ni ne forgesos  
nian bonkoran kaj simpatian amikon.  
Al la familianoj ni esprimas sinceran  
kondolencon.

**GEFA-estraro**

## El la grupoj

### Bremen

Ni ekspoziciis en la kadro de la Evangelia  
Familia Akademio en la urbdoma halo  
la 25an ĝis 28an de Septembro 1980. Ni  
varbis por la aŭtunaj kursoj kaj prezentis  
nian lingvon.

La 22an de Oktobro ni estis kunekun  
gesinjoroj Hartig por gustumi kaj taksi  
diversspecajn vinojn.

### Grupo Kassel

La „nestoro“ de nia grupo, sinjoro  
Paul Keil, la 18an de Aŭgusto 1980  
fariĝis 80-jara.

Li estas ankoraŭ tre vojaĝema kaj se li  
„hazarde“ ne estas survoje, li regule  
partoprenas niajn grupkunvenojn.  
Nia grupo multe dankas al li pro lia  
helpemo, subteno kaj sperto kaj ni deziras  
al li kaj al lia ŝatata edzino ankoraŭ  
sanon kaj feliĉon dum multaj jaroj.

### Renkontiĝo en Koblenz

Pli ol 100 emerituloj el la distriktoj  
Hamburg, Hannover, Münster, Köln,  
Essen, Kassel, Frankfurt/M kaj Karlsruhe  
estis invitataj partopreni renkontiĝon en  
Koblenz. Kelkaj el ili tute ne respondis,  
aliaj sendis salutojn eĉ el feriaj lokoj.  
Al ili koran dankon! 27 personojn mi povis  
nome de la BSW-ĉefestraro bonvenigi la  
6an de Septembro 1980 matene je la 11a  
horo. La estro de la stacidoma  
restoracio disponigis al ni apartan  
salonon kaj bonege zorgis por nia korpa  
bonfarto. La distriktkomisiito de Köln,  
nia kolego Herlitze, meritas koran dankon  
por la antaŭpreparo.

Speciale ni bonvenigis la novulojn, inter  
kiuj troviĝis kolego Schindler el Schwelm.  
Li kaj lia edzino antaŭ nelonge revenis  
de „Bona Espero“ el Brazilo, pri kies  
restado ili ilustre raportis.

La vetero horon post horo pliboniĝis tiel,  
ke ni povis komune ĝui sunplenan  
promenadon ĉe „germana angulo“  
(Deutsches Eck). La disponeblaj horoj  
multe tro rapide forflugis; ne restis tempo  
por detaloj.

Per kaftrinkado ni finigis la babileman  
rondon. Tiamaniere ĉiuj povis atingi  
samtage la hejmon. La tago pasis en  
agrabla atmosfero, kaj mi kredas, ke la  
mono, kiun disponigas la administracio por  
ĉi tiu celo, ne estis vane elspezita. Kelkfoje  
mi aŭdis dankon de la plej maljunuloj.  
Ili ĝojis, ke ili ne estas forgesitaj.

Ĉar la GEFA-jarkunveno okazos ĉijare en  
Oberkirch kaj la IFEF-kongreso en 1981  
en Regensburg (ambaŭ do en la suda  
parto), ni ne povis ĝis nun decidi, kie ni  
renkontiĝu la venontan fojon. Ĉu iu havas  
proponon?

Mi volonte akceptas instigon.

Elfriede Kruse

### El leteroj bonkorecaj

. . . Dek kvin germanajn markojn enhavis nekutima letero, adresita al la „Sinjoro Stacidoma Administranto“ en Ulm. Skribis la leteron okdekjaraĝa sinjorino afliktita per skrupuloj. Ŝia filo, kiel ŝi skribis, ĵus konfesis al ŝi, ke li mallonge post la milito en „granda mizero“ kaŝe forprenis de fervojista tolaĵŝnuro grizan subĉemizon. Per la mono la grandaĝa sinjorino volis rekompenci la domaĝon por finfine rehavi animan pacon. Por ke oni ankaŭ fakte kvitancu la ricevon, ŝi estis eĉ aldoninta adresitan kaj afrankitan koverton kun leterfolio.

Je la sama tempo tute alia travivaĵo igis sinjorinon el Ettlingen skribi leteron al la DB. Ĉiudimanĉe la s-ino kutime vizitis sian malsanan patrinon en malsanula hejmo en Sinsheim. Sed lastan dimanĉon ŝi, pro trajntardiĝo, alvenis tro malfrue en Heidelberg kaj jam

ne atingis la konekstrajnon al Sinsheim. Preni nekstan trajnon al S. estus estinta senutila, ĉar pasos intertempe la vizitaddaŭro. Sed ŝi trovis kompreneman helpon ĉe la fervojistoj. Oni simple entrainigis ŝin al Neckargemünd kaj zorgis pri tio, ke ŝi tie trovos taksion al Sinsheim — ĝustatempe kaj senpage. „Por mi“, ŝi skribis, „tiu travivaĵo estas kaŭzo por kore danki al vi.“ Du bonkorecaj leteroj, kiuj ankaŭ ĉe la fervojo estas legataj ne sen iom da emocio.

El „Blickpunkt“ 5/80

F. Busse

22. Internationale Eisenbahner Skiwoche „IFES — 81“ vom 7. — 14. Februar 1981 im Hotel Bellevue in Bohinj/Slovenien (Jugoslavien). Auskünfte und Anmeldevordrucke durch: Fervojista Esperanto Societo, Vrazova 60, Yu-62000 Maribor.

**Redaktfino por n-ro 1/81 estas la 15.1.1981**



Vintro en Norvegio

foto: Yngvar Hansen/NSB

**Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplanan Novan Jaron.**

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7. Druck / preso: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz